

Numero:219 .
Aŭgusto 2010.

18-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvára Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

RENASKIĜO

VESPERTO renaskiĝis.

Ekde aŭgusto ĝi estas en nova formo kaj espereble ankaŭ en la enhavo Vi trovos multe da novaĵoj.

En la estonto ĝi ekaperos plurpaĝe kaj la nombro de la paĝoj ne estos difinita. Tio dependas de la ricevitaj materialoj.

Anticipe mi dankegas Vian helpon.

Mi deziras, ke mia modesta eldonaĵo fariĝus Via ŝatata legaĵo.

Ekde ĉi numero VESPERTO estos plurpaĝa kaj espereble pli bone legebla.

Mi ŝatus, se en la estonto de Vesperto aktive kontribuu kaj de tempo al tempo Vi sendadus al mi informojn, artikolojn, verkaĵetojn kaj poemojn, kiuj naskiĝis en Via plumo (komputilo).

Do, ek al la laboro kaj helpu min por ke VESPERTO fariĝu inda legaĵo en Esperantujo.

Ne indulgu min skribi Vian sinceran kritikon pri ĝi. Viaj rimarkoj, kritikoj helpas min en la estonta redaktado.

-Redaktanto -



Kial Esperanto?

Ofte mi estas demandita: Kial lerni Esperanton?

La ekzistantaj lingvoj solvas ĉiun lingvan problemon. Sufiĉas ellerni kelkajn mondlingvojn: anglan, germanan, francan, rusan, araban aŭ ĉinan kaj oni povas komprenigi sin.

Ŝajne tio estas logika kaj multaj homoj pensas kial krei novan kaj pligrandigi la nombron de la lingvoj? Kion povas doni Esperanto, kio superas la ekzistantajn lingvojn?

Por neesperantistoj klarigi tion estas tre malfacile. Kiu neniam aŭdis pri la zamenhofa lingvo, tiu ne komprenas la diferencon inter Esperanto kaj aliaj lingvoj.

Ĉiam unue ĉiam oni demandas: kiom da homoj parolas tiun ĉi lingvon? Kie oni parolas ĝin? Kial ĝi estas pli utila, ol alia lingvo?

Ni vidas, ni estas atakitaj per multaj demandoj, al kiuj ni nepre devas doni respondon kaj klarigi la sencon de la internacia lingvo.

Ĝi estas diabla rondo. Kiu esperantistiĝis, tiu scias kial ellerni tiun ĉi lingvon, la aliaj nur sentas, ke tiu ĉi lingva ĥaoso nur sufokas la internacian komunikadon. La grandaj lingvoj subpremas la minoritatajn naciojn kaj kulturojn. Dum la jarcentoj la homaro multfoje spertis tion. Pro la perforta disvastiĝo de la grandaj lingvoj jam malaperis multaj popoloj kaj nacioj.

Ne estas utile, se ies lingvo estas devigite instruitaj en lernejoj. Tamen aliflanke necese lerni fremdajn lingvojn.

Kio estas la solvo?

Laŭ mi tion nur sendependa, neŭtrala lingvo povus solvi, ekzemple kiel Esperanto. Ĝi apartenas al neniu nacio, tamen ĝi estas ĉies lingvo. Ĝia simpla gramatiko kaj majstre konstruita vortotrezoro faras ĝin kapabla facile kaj rapide ellerni.

Tial en la sekvaj jardekoj, eĉ pli frue la Unuiĝanta Eŭropo devus decidi pri ĝia uzado kaj proponi la zamenhofan lingvon, kiel komunikilo por la eŭropanaj civitanoj.

Kompreneble en la unua periodo ĝi estos forte atakata, kaj ĝin oni ekprovos forigi el la ĉiutaga vivo, pruvante, naciaj lingvoj estas pli utilaj por tiu ĉi celo. Sed post kelkaj jaroj Esperanto iĝos la dua gepatra lingvo de eŭropanoj, eĉ por la tuta homaro.

Tio dependos ankaŭ de ni, geesperantistoj, kiel ni prezentos ĝin en la praktiko por la dubantoj.

-Ŝaŝa-

La 83-a Kongreso de SAT en Braŝovo

Ĝi ne apartenas al la plej multnombraj Esperanto-aranĝoj kaj kongresoj, ĉar ĝin partoprenis apenaŭ pli ol sepdek geesperantistoj el 16 landoj.

Tamen por mi tiu ĉi kongreso estas neforgesebla, eĉ la plej bona kiujn mi partoprenis en mia esperantista vivo.

Kial estis por mi neforgesebla tiu ĉi kongreso?

Por ni, hungaroj la urbo Braŝovo estas iomete ankaŭ hungara. Ja iam ĝi apartenis al Hungario kaj ankoraŭ nun tie vivas hungaroj.

Ĉi kongreso pruvis al mi, se diversnaciaj homoj volas, kaj en ilia koro estas bonintenco, tiam ili povas vivi unu kun la alia pace kaj harmonie.

Braŝovo estas pitoreska urbo inter altaj montopintoj.



Braŝovo urbocentro

Ankaŭ mem la kongreso estis interesa. Dum la laborkunsidoj estis multaj gravaj temoj kaj ofte erupciis akraj diskutoj. Laŭ mi ankaŭ tra SAT-okulvitroj la 83-a kongreso de SAT estis rezulta kaj eble ĝi estis mejloŝtono en la historio de la movado.

Kompreneble la renovigado de SAT estas necesa, se ni deziras, ke ĝi ekzistu ankaŭ post jardekoj.

SAT estas laborista esperantista asocio, kies celo labori per Esperanto.



La partoprenantoj de la 83-a Kongreso de SAT

Dank' al niaj braŝovanaj geamikoj, la riĉaj programoj helpis al ni ekkoni mem la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon.

Espereble la kara Leganto komprenos, ke nun mi ĉion ne vicigos tie ĉi, nur la plej gravajn.

Mi longe povus skribi pri la diversaj kulturaj kaj turismaj programoj, kiuj orumis nian restadon en tiu ĉi historiicia, pitoreska urbo. En ĉiu horo de la tago okazis io, kio kaptis nian atenton, kaj ni apenaŭ povis elektadi el ili.

Nur kelkaj, kiuj pleje plaĉis al mi, kaj laŭ mi ankaŭ al la aliaj kongresanoj.

Dimanĉe la 1-an de aŭgusto vespere ni partoprenis komunan vespermanĝon en animagorda restoracio Poiana Braŝovo, kie ni ricevis abundan, bongustan manĝaĵon kaj trinkaĵon. Dume ni povus aŭskulti belegan folkloran muzikon. Malfruvespere jam preskaŭ nokte ni iris al niaj tranoktejoj. Ankoraŭ nun zumas en miaj oreloj tiuj karaj melodioj.



En la restoracio Poiana Braŝovo

Do, ni ege bonfartis en tiu restoracio, sed en la sekvaj tagoj ni atendis ankoraŭ multe da surprizoj. Niaj Braŝovanaj geamikoj faris por ni ĉiam belegajn kaj valorajn programojn.

Nun mi ne povas vicigi ĉiun, ĉar tiam el tiu ĉi kongreso-priskribo fariĝus dika vojaĝlibro. Kompreneble ĝi meritis verki ankaŭ tian libron.

Nepre mi devas mencii la sukcesan aŭtobusan ekskurson al la urbo Sibiu (hungare Nagyszeben), kie malgraŭ la pluvema vetero ni promenadis de strato al strato en bonega etoso.



Promeno en la urbo Sibiu (Nagyszeben). Ni staras antaŭ la iama domo de Andreo Cseh.



Memortabulo pri Andreo Cseh

Antaŭtagmeze estis veteraĉo, sed kiam ni ekskursis al bela vilaĝmuzeo proksime al Sibiu (Nagyszeben), ankaŭ la suno ekbrilis kaj la grizaj nuboj malaperis de super ni. Tiel ni agrable povis promeni en la vilaĝmuzeo vizitante la tieajn vidindaĵojn. Dume ni babladis, amikiĝis ĝuante la avantaĝojn de la zamenhofa lingvo.

Kiu ne konas Esperanton, tiu ne povas imagi kiom facile kaj rapide oni povas kompreni sin kun diverslingvaj homoj. Sen lingvaj malfacilaĵoj la bablado ĉiam estas fluanta kaj ni sentas, kiom bone, ke mi ellernis tiun ĉi lingvon.

Fakte ankaŭ per lingvoj oni povas komuniki, sed ĉiam estas senteblaj la lingvaj muroj, kiuj staras antaŭ la homoj. En la aero ŝvebas la timo, kio okazos, se mi ne povos kompreni min.

Malfruvespere ni revenis Braŝovon. Vere ni tre laciĝis, sed pro tio neniu ĉagrenis, ĉar la ekskurso estis belega.

Se oni fartas bone, tiam rapide flugas la tagoj. Unu semajno estis nur momento, kaj fulmrapide proksimiĝis la adiaŭa tago. Sed antaŭe ni partoprenis denovan komunan vespermanĝon en la restorecio La Karpata Cervo, kie nin akceptis surprizoj.



Komuna vespermanĝo kune kun spektaklo de popoldancoj

Ni estis invititaj en la vinkelon de la restorecio. Ni gustumis diversajn vinojn kaj oni regalas nin per bongusta antaŭmanĝaĵo. Dume ni aŭskultis rumanan popolmuzikon. Poste ni supreniris, kaj en brila manĝejo de la restorecio oni servis al ni lokan specialaĵon: farĉitan brasikon kun ruĝa kaj blanka vinoj. Al la vespermanĝo ankoraŭ apartenis ankaŭ fruktoglaciaĵo, kiu tre gustis al ĉiu. Ankaŭ tiu ĉi povintus esti la krono de la vespero, sed subite ankaŭ en la manĝejo eksonis la muziko, kaj unu post la alia kuris mezen popoldancistoj kaj prezentis al ni belajn rumanajn dancojn en originalaj popolkostumoj. En la paŭzoj de la dancoj gekantistoj kantis al ni.

Ĉu ankoraŭ eblas pliigi la travivaĵojn? Certe nun estus tia homo, kiu dirus: ne. Mi devas refuti la dubantojn, ĉar niaj karaj gastigantoj zorgis, ke ni bonfartu ankaŭ en la lasta tago.

Vendrede post la oficiala fermo de la kongreso okazis duontaga ekskurso al konata, montara ekskursejo Sinaia, kie ni vizitis la someran rezidejon de la rumanaj reĝoj.



Sinaia, Kastelo Peleș

Tie ni vizitis la belegan kastelon. Ni ĉiuj estis ravitaj de la multaj vidindaĵoj.

Bedaŭrinde en Sinaia ni ne povis pasigi longan tempon, ĉar vespere nin atendis koncerto en fortikaĵopreĝejo proksime al Braŝovo. Ni devis rapidi, por ke ni ne malfru. Sur montaraj ŝoseoj nia ŝoforo stiris la buson, kiel aŭtomobilo-konkursanto. Dank' al Dio ni bonŝanĉe alvenis la koncertejon kaj ni denove povis aŭskulti belegajn melodiojn, eĉ esperantolingvaj kantoj eksonis.

Iutage ĉio finiĝas kaj sabate kun dolora koro ni devis adiaŭi de Braŝovo.

Ĝis en Sarajevo en 2011 !

-Apáti Kovács Béla-

Aventuro

(Noveleto)
-dua parto-

-Ĝi estas pordego al alia dimensio.

Emeriko unue surpriziĝis, sed poste rekonsciiĝante pensis, ke la maljunulo estas freneza. Estus bone rapide forlasi ĉi damnitan lokon.

Ili mute staris antaŭ la roko. Longe nenio okazis. Emeriko jam deziris foriri, kiam lia akompananto retiris lin kaj diris:

-Sekvu min, nun ni eniras alian dimension. Vi travivos eksterordinaran aventuron.

Antaŭ ol ekparolus Emeriko, la maljuna homo denove eklevis sian dekstran brakon kaj la roko rontraŭante la fizikajn leĝojn malrapide komencis suprenleviĝi kaj en la sekva momento la ĉirkaŭaĵon inundis brilega lumo.

Emeriko instinkte kovris siajn okulojn per mano.

Poste tuj profunda silento regis ĉe la roko. Neniu bruo estis aŭdebla. Ankaŭ la birdopepado mutiĝis, kvankam alveninte sur ĉiu arbo birdoj triladis.

Nun ĉio mutiĝis. Timiga estis tiu ĉi silento. Emeriko paralizite staris apud la maljunulo, kaj li nur atendis.

Malrapide la akra brilego mildiĝis, kaj bone estis videbla la pejzaĝo. Je sia granda miro Emeriko troviĝis en nekonata mondo.

Vere ĝi estis nekonata nur en la unua momento, ĉar post iom da tempo en la malproksimo desegniĝis la konturoj de vilaĝeto, kiun li jam vidis iam.

Jes en tiu vilaĝeto li feris somere ĉe siaj geavoj. Belegaj jaroj ili estis.

Li deziris demandi ion de la maljunulo, sed li malaperis. Vane li vokadis lin, respondo ne venis.

La koro de Emeriko rapide pulsadis kaj li estis tre ekscitita.

Emeriko ekiris al la vilaĝeto. Li sciis, siaj geavoj jam delonge mortis, kaj li ne esperis renkontiĝi kun ili.

Tamen en la vilaĝeto lin atendis surprizo. Ĉio estis tia, kia infanaĝe dum tiuj neforgeseblaj someroj.

Irante en la vilaĝeto la domoj, homoj, arboj estis konataj. Neniu ŝanĝiĝis.

-Neeble, ke mi revojaĝis en la tempon – li ekkris.

Sed je la laŭta krio neniu eklevis sian kapon, kvankam en la proksimo kelkaj vilaĝanoj estis.

Li preteriris viron, samaĝan, kiel li. Sed infanaĝe tiu viro en la okuloj de Emeriko estis onklo.

-Salut'! – diris feliĉe Emeriko ekkonante lin.

Sed la viro ne reagis. Li iris preter li indifere. Emeriko denove salutis lin:

-Saluton oĉjo Béla!

Ne venis resaluto.

Kio okazis?

Longaj minutoj devis pasi, ke li rekonu: li ne estas videbla en tiu ĉi dimensio. Li vidas ĉiun kaj ĉion, sed lin vidas neniu.

Strange! Li revojaĝis en la tempon kaj li denove povas travivi tiujn karegajn tagojn, kiuj estis por li neforgeseblaj.

Li decidis iri al la domo de siaj geavoj. Vere li timis, ĉar li ne sciis, kio atendos lin tie?

La dometon li tuj rekonis kaj preskaŭ kurante li proksimiĝis tien.

La ĝardena pordo facile malfermiĝis, ĉar lia avo ofte oleumis ĝin.

Li denove sentis lin infano. Tio estis bonega kaj kortuŝa sento. Antaŭ la enirejo li haltis.

-Kion faras ene la geavoj? – li demandis de si, sed li ne ricevis respondon.

Timeme li malfermis la pordon. Komprenable li ne estis videbla. La domanoj ne vidis lin.

Li staris en la antaŭĉambro de la domo kaj ĉirkaŭ li iris tien – reen siaj geavoj. La avo grumb

lis pro io kaj la avino ekprovis trankviligi lin. Sed sensukcese.

Emeriko deziris ĉirkaŭbrakumi ilin. Ĉiufoje kiam li intencis fari tion, li tuŝas nur aeron per siaj manoj.

Li revojaĝis la tempon kaj li vidis siajn geavojn, sed tio ege ekskuis lin, kiam el la najbara ĉambro li elvenis, kiel knabeto. Li vidis sin kaj tio estis tre, tre kortuŝa.

Emeriko preskaŭ ekploris. Li ne povis elteni longe la vidindaĵon. Li tremis kaj sentis kapturniĝon.

Li ne komprenis, kio okazis? Kial li devis travivi tiujn ĉi momentojn.

Emeriko ankoraŭ iomete staris en la antaŭĉambro, sed la kapo tre ekdoloris lin. Li ne povis longe resti tie. Rapide li forlasis la domon kaj komencis kuri, kuregi.

Kiam li rekonsciiĝis, trovis sin sur flora kampo kaj subite li ekvidis la maljunulon venanta al li.

-Kie mi estas? – demandis Emeriko

-Vi endormiĝis. Bonvolu rapidi, ĉar sinjoro instruisto atendas vin.

-Sed antaŭ nelonge mi estis en

-Tio nun ne gravas. Nun mi devas rapidi.

-Mi komprenas nenion. Eble mi stultiĝis. Hieraŭ vespere mi alvenis kaj poste..... mi ne scias kio okazis?

La maljunulo nur ridetis mistere kaj kun Emeriko ekiris al historioinstruisto Varga Bertalan, kiu jam atendis ilin.

Li sonĝis nur la tutan aventuron.

-Apáti Kovács Béla-



POR INFANOJ

La sepkapa drako

Kaj estis kaj ne estis trans la Fabeloceano estis belega lando. Tie vivis maljuna reĝo kun sia admirinda filineto Sunbrileto.

La maljuna reĝo tre tre timis la knabineton. Ĉiutage antaŭ sian ĉambron li starigis gardistojn. La reĝidino ĉien soldatoj akompanis, kaj neniu rajtis iri proksimen al ŝi.

La malfeliĉa knabineto ne havis geamikojn. Dum la tuta tago ŝi devis sidi apud sia patro en la tronejo.

Sunbrileto ege enuis tie, kaj revis ludi kun la aliaj geknaboj, kiuj feliĉe ludis antaŭ la reĝa palaco sur la flora kampo.

En iu tago ŝi decidis, ke eskapos kaj ŝi serĉos ludamikon en la proksima vilaĝo.

Tio estis ege malfacila, ĉar la soldatoj gardis ŝin tage kaj nokte.

Sed la hazardo helpis al la reĝidino, ĉar la gardostaranta soldato endormiĝis, kaj ŝi povis kaŝe forlasi la ĉambron. Ŝi rekte kuris al la proksima vilaĝo por serĉi geamikojn.

Komence ŝi pensis, trovi amikon aŭ amikino estis facila afero. Vane ŝi iris al la infanoj, ili ĉiuj kuris hejmen, ĉar en la vilaĝo estis anoncita, kiu ludas kun la reĝidino sen permeso, tiu estos punita. La reĝo fermigos tiun en karceron, kaj restos tie por ĉiam. Tiam la geknaboj tuj kuregis hejmen ekvidante la filinon de la reĝo.

Sunbrileto tre malgajiĝis vidante, ke la homoj timas de ŝi kaj neniu volas ludi kun ŝi.

Ŝi senkonsile vagadis sur la strato de la vilaĝo kaj senĉese ŝi ĝemadis:

-Neniu deziras ludi kun mi. Mi ne havas geamikojn.

Apud la vilaĝo estis granda arbaro en kiu loĝis la sepkapa drako. Ĉiu timis de ĝi, ĉar onidire la drako forrabas infanojn kaj portas ilin en sian subteran kastelon.

Al la drako ekplaĉis la reĝidino kaj decidis, ke ĝi iros al ŝi. Ĝi elvenis el inter la arboj kaj vokis ŝin.

-Salut'! Kial vi estas malgaja? – ĝi demandis la plorantan knabinon – Viaj okuloj estas larmaj. Ne ploru kara knabineto!

La reĝidino aŭdis pri la timiga drako, sed ŝi ne devis timi de ĝi ĝis nun, ĉar la soldatoj ĉiam defendis ŝin. Unue ŝi ege ektimis, sed fine ŝi

rezignis. Se neniu deziras ludi kun ŝi, tiam ŝin ne interesas, se la drako forrabos ŝin.



Kiel ŝi pli bone rigardis la drakon, ŝi tuj rimarkis, ke ĝi ne havas sep kapojn, nur unu kaj ankaŭ la okuloj de la drako brilis eta larmoguto. Tiam jam ĝi ne estis tiom timiga, kiel en la unua momento, kiam ŝi ekvidis ĝin.

-Mi tial estas malgaja, ĉar neniu emas ludi kun mi. Mia patro malpermesis al la vilaĝanoj, ke ili proksimiĝu al mi. Mi estas tro sola. Mi ne havas geamikojn. Diru al mi kara drako, ĉu vi estos mia amiko.

La drako regajiĝis kaj saltadante ĝi diris:

-Tre volonte. Tre volonte. Sciu, ĉiu timas de mi kaj oni disvastigas pri mi misfamon, ke mi forrabas infanojn kaj portas ilin en mian subteran kastelon. Mi ne havas tian kastelon. Ja, mi estas malfeliĉa drako, kiu vivas en sia arbara kabaneto. Se vi deziras, mi montros ĝin al vi. Vi ne devas timi de mi, mi ne estas tiel terura besto, kiel oni asertas tion. Miaj karegaj gepatroj mortis, kaj mi restis sola.

Ili longe babiladis pri sia malfacila sorto kaj senrimarke ili fariĝis sinceraj geamikoj.

Kompreneble la reĝo serĉigis sian filinon. Centojn da soldatoj estis dissenditaj serĉi Sunbrileton. Iu vilaĝanino perfidis, ke la knabino malaperis en la arbaro kun la drako. Certe ĝi forrabis ŝin.

La reĝo sendis pli multe da soldatoj, eĉ ĉiun en la arbaron liberigi la reĝidino el la subtera kastelo de la drako. Tuta armeo proksimiĝis al la kabano, kies maldensejo feliĉe ludis la reĝidino kaj la drako. Ili laŭte ridis kaj senzorge kuradis. Ili forgesiĝis pri la mondo.

Kiam la reĝo ekvidis ilin li hontiĝis, ĉar ankoraŭ neniam vidis tiom feliĉa sian filinon. Krome ankaŭ li vidis, ke la drako ne estas timiga. Ĝi ne havas sep kapojn, kiel oni asertis dum tiom multe da jaroj.

-Halt'! – li diris al la soldatoj – Iru hejmen! Mi ne bezonas vin.

La soldatoj komprenis nenion. Por ili estis strange, kio okazis. Sed kiam la patra koro eksentas, kio estas bona por sia unusola filineto, li ŝanĝigis la decidon.

Li invitis la drakon kaj ĉiom da vilaĝanaj infanoj al la reĝa kastelo, ke ili ludu kun lia filineto kaj ŝi ne estu sola en la estonto. Ĉiela sento estas, kiam la infanoj feliĉe ridas, kriadas en la reĝa kortego, ĉar tiam estas paco en la lando.

-Onklo Adalberto-